

Nia feria migrado en Alpoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 621, 1975.09.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni invitas vin plilongigi la someran feriperiodon, prezentante raporton pri migrado okazinta en Alpoj. Tiu ĉi rakonto helpu vin konatiĝi kun pejzaĝoj svisaj.

A.- La dimanĉon 3-an de aŭgusto, post la necesaj preparoj, ni ŝlisis la pordon de nia domo, por aŭtomobile nin direkti al Berna Oberlando. Ho, ni ne estis tre rapidemaj, ĉar nur la postan tagon ni devos renkontiĝi kun la partoprenontoj al la dua Migrado en Svislando, kies organizanto estas Svisa Esperanto-Junularo aŭ laŭ la mallongigo SEJ.

Cl.- Varma suno somera jam je la deko horo forpelis ĉies energion kaj donis emon siesti sub arboj aŭ lacertumi duonnude apud lago. Ni elektis la ombron kaj celadis arbaron de la svisa mezlando.

A.- Sed unue estis necese forlasi la ĵurasan montaron, kie ni loĝas. Por eliri nian valon La Sagne, kiu situas je mil metroj de alteco, estas necese transveturi pasejon nomata Vido al Alpoj, ĉar el tie, kiam la vetero estas tre hela kaj sennebula, oni povas admiri vastan panoramon al la alpa montaro de Savojo al Berna Oberlando. Tiu vasta horizonto estas unu el la belecoj de Ĵuraso. En aŭtuno kaj vintro ĝi estas invito al migrado piedira aŭ skia. Sed tiu ĉi somera dimanĉa mateno jam tiom varma ne favoras la turistojn, kiuj esperis vidi la blankajn alpoj Monto Blanka aŭ Eiger, Mönsch kaj Jungfrau. Ili devas kontentiĝi per la ekzameno de panorama tabulo.

Cl.- En la paŝtejoj aŭdiĝadas la muziko de la bovinaj sonorilo. La altaj gencianoj flavaj staras kun belegaj kaj imponaj abioj en tiuj vastaj herbejoj, kie piknikantoj sin instalas por rosti je turniĝanta stango grandan viandpecon. Aliaj familioj decidis ekskursi : la patron, kiu portas pezan dorsosakon, sekvas ekzino kaj infanoj malpli ŝarĝitaj. Iliaj montŝuoj atestas, ke nelacigeble ili marŝos, malgraŭ la varmo suna.

A.- Jen la regiono, kiun ni forlasas. La strato, kiu alsupris ĝis milducent metroj super la marnivelo, realvalas enirante vastan arbaron. Ni subite troviĝas en tre vasta valo, la *Val de Ruz*, kie ĵus finiĝis la fojnado kaj anonciĝas la grenrikoltado. Vico da vilaĝoj duon-kaparanaj kaj duon-industriaj ĵetas en la ĉielon sian preĝejajn sonorilejojn kaj majesta kastelo fermas la eniron de gorĝo, kiu kondukas al la urbo *Neuchâtel*.

Cl.- Tie loĝas mia patrino. Ŝin ni iras rapide saluti. Ni trovas ŝin ripozanta en sia ĝarneteto meze de rozoj kaj plej diversaj floroj. Ŝi admirigas al ni ciklamen-planton sovaĝan, kiu floras sub piceeto.

A.- Neuchâtel estas urbo konstruita sur la flanko de monto, pro tio la domoj etaĝiĝas vice unu apud la aliaj. Kaj la rigardo iras ĝis la lago, kie centoj da velŝipoj vagadas. Blankaj kaj koloraj makuletoj sur la bluverdo laga.

Cl.- Panjo ŝatus restigi nin pli longe. Ŝi proponas trinkadon, Sed estas danĝere sidiĝi, do ni tuj adiaŭas, promesante poŝtkarton el la alpoj.

A.- Neuchâtel estas plaĉa urbeto, kies malnovaj domoj estas flavŝtonaj. Ĝiaj kastelo kaj kanonika preĝejo vartas el monteto super tegmentaro. Kaj la nova urbo iras ĉu al la konkero de la lago aŭ de vitejoj, kiuj etendiĝas borde de Ĵuraso.

Cl.- Sed per aŭtomobilo oni estas rapide for. Aŭtoŝoseo jam kondukis nin al la limo de nia kantoneto *Neuchâtel*. La rivero *Thielle* aŭ *Ziehl* atestas, per siaj du nomoj franca kaj germana, ke ĝi disigas du kulturojn. Je ĝia okcidenta bordo la domoj grupiĝas en vilaĝoj, kie la vivo siatempe disvolviĝis sur la strato. Je ĝia orienta bordo imponaj lignaj farmdomoj dise etendiĝas. Ĉiu el ili estas mondeto. Tiujn domojn ni admiras nesatigeble dum kilometroj. Kaj iliaj ĝardenoj, ĉiu el ili estas ĉefverko, kie la logombedojn ĉirkaŭas floranĝoj. kiuj ne ŝparas la rimedojn : ni emus halti antaŭ ĉiu domo.

A.- Jam de pli ol 150 jaroj la limo inter la kantonoj *Neuchâtel* kaj *Bern* estas pli simbola ol reala. Tamen la profundaj vivkutimoj restis. Neniam ĝardenema romando konkurencos la kultivarton de alemano. Kaj ne nur la florojn oni admiru. Kiu scias rigardi, tiu rimarkos, ke ofte eĉ sterkamaso povas esti ĉefverko, kiam ĝi estas plektita.

Cl.- Diskutante pri tiu berna civilizo, kiu ankoraŭ nun respegulas la potencon de civito aristokrata, kiu sciis lasi al la kamparanoj sufiĉe da aŭtonomeco kaj privilegioj, ni iom post iom alproksimiĝas de la celita arbaro, kie ni deziras ripozi. Arbaro tre malsimila de tiuj de nia Ĵuraso, kie regas abioj, piceoj kak fagoj. Tie ĉi la arbspecoj estas multe pli variaj. Kaj la kverkoj liberigas vastajn areojn, kie estas agrable instaliĝi. Tion ĉi ni faras, muntante tablon, seĝojn kaj eĉ litojn kampingajn.

A.- Dum ni kviete legos, eĉ kapreolon ni povos observi. Kaj kiam ni deziras ripozi de la ripozado, kelkajn paŝojn kaj ni estos en frambejo. Ĝis satiĝo plena ni povos deserti, antaŭ ol reiri legi aŭ dormeti.

Cl.- Jen kiel ni nin pretigis al longa migrado tra Alpoj. La venontan semajnon ni daŭrigos nian ferian rakonton, kiu malkovrigos al vi pejzaĝojn svisajn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!